



# Boletín

nº 447 Julio - Septiembre 2024



*Asociación de utilidad pública*

FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Boletín  
Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 447

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: José Antonio del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es  
angelarquillos@gmail.com

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun per-  
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio  
*Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López

Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Elsa Martínez Castro

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)

“ María Milagros Mezo

Junularaj aferoj: Pako Balibrea

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400 (pdf-a)  
ISSN 2444-8397 (papera)

# SALUTVORTOJ

## Karaj gelegantoj,

Belajn artikolojn kaj raportojn, vi trovos kiel kutime en la bulteno, sed ĉi-okaze la enhavo estas precipe interesa por tiuj, kiuj ne ĉeestis la hispanan kongreson, ĉar ne mankas bonaj kuraĝaj kontribuantoj, kiuj lerte verkas kaj esprimas la sperton kaj detale raportas pri la ĉefa evento okazanta ĉiujare en nia lando. Ĉi-foje en la urbo Ĉesto (Valencio), kun ĉeesto de pli ol 100 homoj kaj partopreno de la prezidanto de UEA Duncan Charter interalie.

Mi elkore dankegas la bonan laboron de la membroj de la LKK, kiuj estis je nia dispono la tutan tempon kaj la evento okazis kiel planite en bona etoso. Mi ankaŭ dankegas la urbestron, kiu invitis nin al populara danca spektaklo kun gustumo de dolĉaĵoj en la urbocentro.

Kaj post la neforgesebla sperto en Ĉesto, grupo de samidenoj el Madrido, jam pretigas la venontan kongreson, kiu okazos en la urbo Sorio kaj de nun vi povas aliĝi, ĉar la aliĝilo aperas sur la dua kovrilo. Ne hezitu profiti la plej favoran prezon. Valoras la penon viziti unu el la plej belaj urboj de Hispanio.

Aliajn artikolojn kiel tiu pri UNED vi devas atente legi, ĉefe tiuj, kiuj bezonas plibonigi siajn lingvajn kapablojn.

Ĝuu la legadon

La redaktoro

# ENHAVO

Salutvortoj	1
Nekrologe	2
Protokolo Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
Eksterordinara kunveno de la estraro	5
Nova interkonsento inter HEF kaj la Ministerio pri Kulturo	5
Ni venis, ni vidis, ni valenciis	6
83-a HISPANA Kongreso de Esperanto	14
2a konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto	16
Fundación Esperanto	17
Infanoj kaj eksterlandaneco	18
Pasinteco kaj estonteco de la kurso UNED	19
HEF en la Universala Kongreso de Aruŝo	25
Pluvivo	26
La stranga angulo, ĉapitro 13	28
Esperanto en virtuala muzeo pri la hispana milito	30
Pri Gaza en el corazón	30
Iom da matematiko (15)	31

## SUR LA KOVRILO, SALONO DE LA URBODOMO DE CHESTE (ĈESTO)

---


### NEKROLOGE

La 11-an de septembro forpasis nia samideano Josep M<sup>o</sup> Galofré i Domingo, iama vicprezidanto de HEF.

Li naskiĝis la 2-an de februaro 1938 en Vila-Rodona, kaj li esperantistiĝis en 1963 en Sabadell, kie li vivis de longe, kaj de kies Esperanta rondo li estis prezidanto. Li multe aktivis en sociaj movadoj en sia urbo, kaj en 2001 ricevis la Oran medalon de Sabadell.

Li organizis kursojn de Esperanto en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, estis sekretario de la komisiono por starigi monumenton al Zamenhof en Sabadell, organizis televidajn kursojn, kaj prezidis la LKK de la hispana kongreso en 1995 en Salou, inter aliaj meritoj.

Li estis tre vigla aktivulo en la Kultura Asocio Esperantista, kies prezidanto li estis dum longa tempo. Li estis vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio inter 1993 kaj 2005.



HEF kondolencas lian familion.

# PROTOKOLO

## Ordinara Ĝenerala Kunveno 08sep2024

La 8-an de septembro 2024 je la 10:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kadre de la 82a Hispana Esperanto-Kongreso okazanta en Cheste, *Complejo Educativo*, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (19a de majo 2024)
- 2.- Renovigo de la estraro
- 3.- Komentoj pri la dokumentoj kiuj estis formale aprobitaj en la antaŭa kunveno
- 4.- Membro-kotizoj por la sekva jaro
- 5.- Projektoj por la sekva jaro
- 6.- Sugestoj kaj demandoj

Ĉeestantoj:

Partoprenas la kunvenon 15 individuaj membroj de HEF, unu el ili reprezentata, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Bilbaoa, Madrida (Liceo), Liberanimo (Teruelo), Andaluza kaj Valencia.

### **1- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (19a de majo 2024)**

Ĝi estis publikigita en *Boletín* numero 446. Oni aprobas ĝin unuanime.

### **2.- Renovigo de la estraro**

La nuna estraro estis elektita en oktobro de 2020, do, laŭ la statuto, la Ĝ.K. devas elekti novan estraron. Sin prezentas neniuj individua kandidato kaj unu sola teama kandidataro. Ĉi tiu konsistas el:

Ángel Arquillos López, kiel prezidanto  
Alberto Granados Orcero, kiel vicprezidanto  
Manuel Parra Benito, kiel sekretario  
Elsa Martínez Castro, kiel vicsekretario  
Jesús M. García Iturrioz, kiel kasisto  
M<sup>a</sup> Milagros Mezo del Río  
Francisco Balibrea Iniesta  
Vicente Manzano-Arrondo

Oni voĉdonas tiun teaman kandidataron: 17 por; neniuj kontraŭ; tri sindetenoj.

Do, estas elektita por kvarjara mandato la dirita estraro.

### **3- Komentoj pri la dokumentoj kiuj estis formale aprobitaj en la antaŭa kunveno**

La kasisto klarigas iujn enspezojn kaj elspezojn, menciante la eksterordinaran elspezon por renovigo de la sidejo (ŝanĝi fenestrojn kaj refarbi). Pro tio la buĝeton oni refaris por ke ĝi restu ekvilibra.

### **4.- Membro-kotizoj por la jaro 2025**

Pasintjare oni altigis la kotizojn por la membroj kiuj ricevas la bultenon papere (OM), la kolektivaj (KM) kaj la patronaj (PM).

Nun ni proponas lasi ilin senŝanĝaj por la venonta jaro. Oni aprobas la proponon.

### **5.- Projektoj por la jaro 2024**

Daŭras la laboroj por fari bitan eldonon de la libro de Antonio Marco *Analoj de la Esperanto-movado en Hispanio*. Ni esperas fini la projekton antaŭ la jarfino.

Plu okazadas la kursoj de Esperanto en UNED, laŭ la interkonsento inter ĝi kaj HEF. Por la lernojaro 2025-26 estas plano enkonduki trian nivelon: B2.

### **6.- Sugestoj kaj demandoj**

Aperas la propono fari teamon por kunlabori en la projekto *Kulturo de Paco* de UNESKO. La proponanto verkos prian artikolon por Boletín.

Oni proponas, ke HEF kunlaboru en la disvastigo de la Erasmus-projekto “30 oraj horoj”.

Oni demandas: ĉu HEF subvencias la kurson de la asocio de Kolombio. Respondo: nur unu fojon, antaŭ du jaroj, HEF subvenciiis tiun kurson.

Eble indus krei novan retroŝtan liston de estraranoj de grupoj, por interkonsiliĝi pri teknikaj aferoj.

La kunveno finiĝas je la 11:50 horo.

Manuel Parra  
sekretario

# EKSTERORDINARA KUNVENO DE LA ESTRARO

La 26an de septembro rete kunsidis la renovigita estraro de HEF. Jen kelkaj el ĝiaj decidoj.

-Iuj taskoj, ĝis nun faritaj de eksaj estraranoj, estis atribuitaj al la novaj. Pako atentos la adreson <hejs@esperanto.es>, pri junularaj aferoj; kaj Elsa atentos la adreson <info@esperanto.es>, per kiu la ĝenerala publiko petas informojn.

- Por reklami la UNED-kursojn, ni decidis meti pagatajn reklamojn en Fejsbuko kaj aliaj similaj lokoj, kun la limo de 300 €. Ankaŭ ni anoncos ĝin en Eventaservo.

-Pri la preparoj por la venontjara kongreso en Sorio, la estraro aprobis la buĝeton kaj la Unuan Anoncon, kaj modifis la aliĝilon proponitan de la organizantoj. Badaŭ eblos aliĝi per interreto. La estraro dankas al la organizantoj pro tia rapido.

-Oni dubas pri la adekvata bontenado de la materialo aparteninta al la iama Hispana Esperanto-Muzeo, de S-ro Hernández-Yzal. Ĝin akceptis donace la magistrato en 2021 por krei ian Esperantan eksponejon. La sekretario demandas al la magistrato de Subirats pri la stato de tiu materialo.

Informas la kasisto, ke la grupoj de Cheste kaj Valencio transdonis al HEF 400 € kiel profito de la kongreso en Cheste. Ni dankas la organizintojn.

---

## **Nova interkonsento inter HEF kaj la Ministerio pri Kulturo**

La pasintan 20an de junio, Hispana Esperanto-Federacio kaj la Ministerio pri Kulturo subskribis novan interkonsenton por reguligi la provizadon de metadatenoj kaj bildetoj far la Federacio al la Ministerio kaj pere de ĉi lasta, al Europeana. La interkonsento reguligas ankaŭ la uzadon de tiuj metadatenoj kaj bildetoj flanke de la Ministerio kaj Europeana.

La unua pria interkonsento inter la Federacio kaj la Ministerio okazis en septembro 2012.

La Leĝo pri Jura Reĝimo de la Publika Sektoro, de 2015, reguligas nun la kontraktojn kaj interkonsentojn de la Administracio. Inter la novaĵoj de la leĝo troviĝas la maksimuma daŭro de la interkonsento: 4 jarojn, kun ebla pluvalidigo de maksimume 4 pliaj jaroj. La subskribo ne kunhavas financajn devigojn, sed por adaptiĝi al la leĝo kaj plenumi niajn metadatenojn publikigitaj en Europeana necesis la subskribo de tiu nova interkonsento.

La interkonsento estas publikigita en la Oficiala Ŝtata Bulteno (*Boletín Oficial del Estado, BOE*). Kaj ni ricevis la konsenton de la Ministerio publikigi ĝin ankaŭ en Bitoteko. En ambaŭ lokoj vi povas legi la kompletan tekston.

Ana Manero

# NI VENIS, NI VIDIS, NI VALENCIIS

Kongrese, postkongrese, kvintesence.

Dennis Keefe, Cullera, Hispanio.

La 30an de septembro, 2024

En novembro lastjare grupo da Esperantistoj de Valencio, de Chesto kaj de pluraj malgrandaj urboj de la regiono, parolante hispane, vizitis la direktoron de la Universidad Laboral de Chesto. Dum pluraj horoj li, promene, montris al ni la belan, arbo-plenan terenon de tiu eksterurba centro-edukativo, kaj sidante ĉe longa tablo, detaligis al ni kiel tiu bela loko tiom taŭgis por nia landa kongreso : klasĉambroj, dormoĉambroj, kunveno-lokoj, studenta restoracio, ekspoziciejo, kaj la neforgesebla, 200-kapacita, luksa, akustike-perfekta salonego, : la tuto, krom la dormoĉambroj, koncentriĝis, en unu loko, ĉio apude, ĉio praktika. Prezoj? Ĉiuj prelegejoj, salonego, kunveno-ĉambroj, ekspozicio-lokoj: senpage. Jes ja! Kaj la dormoĉambroj? Ne certas, sed eble ankaŭ senpagaj; se ne, 15 eŭroj ĉiunokte. Jes ja! Kaj ĉu spaco por 150 eĉ 200 kongresanoj? Nenia problemo, finfine la instalaĵoj povis bonvenigi milojn da studentojn kaj vizitantojn. Jes ja!



Plene konvinkite, ni tuj skribis la dokumentojn petatajn de la estro, subskribis ilin oficiale, sendis ilin elektronike al la Universidad Laboral, kaj kiam la direktoro eklegis la paperojn, li re-skribis al ni, dirante, ke ĉio ŝajnas bona, ĉio estas en ordo, kaj ke li jam aprobis, kaj ke li sendos la dokumenton la sekvan tagon al Valencio. La sekvan tagon. Ho ve! Tiu sekva tago forvaporigis. En tiu posta tago, ekde tiam, li ne plu estis la estro de la Universidad Laboral! Li estis subite, neatendite eksigita, kaj nia oficiala peto kuŝis dormanta en lia oficiala komputilo. Nova estro? Ne. Neniu estro dum ĉirkaŭ dek semajnoj. Nervo-streĉa atendado dum kiu la kongreso-horloĝo ne haltis tiktaki. Krizo. Dum tiu interregada periodo, ni devis haste starigi novan serĉadon, nian planon B. Ne plu estis garantio de io ajn en Cheste. Ni devis serĉi aliloke. Ni trovis plurajn lokojn, eĉ senpagajn ene kaj ekster Valencio, sed neniam tiel bonajn kiel tiu oferto en Cheste. Feliĉe ni ne bezonis, ĉar en februaro, finfine, nova estro instaligis, kaj aprobis nian originalan peton. La samaj dormejoj, prelego-ĉambroj, tuj apuda studenta restoracio. Do, ek al la konkretigo, la efektivigo, la realigo! Ek al la fina aranĝo de la prelegantoj, la Post-Kongreso. Multaj, multaj detaloj. Multaj semajnoj. Tamen ni preterpasu semajnojn da detaloj, kaj ni iru rekte al la unua semajno de septembro, 2024.



Parenteze, kial septembro? Kial la 5an, 6an, 7an kaj 8an? Nia originala plano estis aranĝi la kongreson en la unua semajno de majo, kiel ofte okazis en la lastaj jaroj en Hispanio, tamen kun la harstariga atendado de decembro, januaro kaj februraro, sen certeco je io ajn, ni kredis, ke estus pli prudenta okazigi la Kongreson post la printempo. HEF konsilis al ni ne fari la hispanan kongreson samtempe kun alia granda kongreso. Kaj nur eblis en la Universidad Laboral en septembro. Kial ne antaŭ la 5a? Ĉar la universitato estis fermita dum la lasta parto de la somero. Kial ne poste? Ĉar 24 horojn post nia foriro alvenos la novaj studentoj de la aŭtuna semestro. Do, inter la 5a kaj la 9a.

Kaj kiel disvolviĝis la Kongreso? Unu el la tre specialaj trajtoj de ĉi tiu Kongreso estis la abundaj prelegoj. Pli ol 30, kun 24 prelegantoj. Kutime en hispana Landa Kongreso povas esti 7, 10, eble 12 prelegoj. Sed kial tiom da oficialaj paroladoj ĉi-foje en 2024? Nu, la unua respondo estas, ke la Universidad Laboral – la "Centro-Educativo de Cheste" – estas tute izolita, for de la urbo, sur la kamparo. Ne eblis dum la Kongreso, se vi ne havis veturilon, iri ien ajn. Ne eblis manĝi ekstere, ekskursi ekstere, fari ion ajn ekstere. Viziti la belajn vindindaĵojn de Valencio dum HEK 2024? Tute neeble. La nura eblo estas resti sur la instruado-tereno kaj esperantumi, centelcente esperantumi. Parto el tiu esperantumado konsistis el ĉeestado de la 32 prelegoj, atelieroj, verkisto-horoj, ktp, en la 12-hora periodo dediĉita al ili. Multe da prelegoj, tamen multe da surlokaj "kaptitaj" kongresanoj kiuj volis esperantumi. Alia kialo por havi tiom da prelegoj estis la entuziasmo de la prelegantoj mem. Lokaj, valenciaj Esperantistoj volis prelegi. La AMO-seminario bezonis sufiĉe da prelego-spaco. Ni eĉ devis diri NE al pluraj prelegantoj post jam monatoj antaŭ la Kongreso. Prelegoj plenpenis ĉi jare.



Kvankam LKK-anoj antaŭe timis, ke ne estus multe da ĉeestado al la prelegoj, kaj kvankam tri prelegoj okazis samtempe en tri malsamaj lokoj, la tuta, hora ĉeestado oscilados inter 50 kaj 80, tre alta procentaĵo de la kongresanoj, kaj ĉiuj prelegantoj havis multajn ĉeestantojn, kutime inter 10 por la malgrandaj, kaj ĝis 58 por la plej granda. Bona sukceso. Mi ne povas listigi ĉiujn parolantojn ĉi tie, sed post la fino de la artikolo, vi povas vidi kiuj prelegis, kaj kiel titoliĝis la prelegoj. Pri la loko por ĉiuj paroladoj, bedaŭrinde ni devis lastminute improvizi, ĉar la Universitato ne donis al ni la kontrakto-promesistajn prelegejojn, forstrekante du el tri el ili! Specialan dankon ĉi tie al Duncan Charters, kiu tuj volontulis paroli en la ne tiom taŭgaj, eksteraj lokoj, sen ekrano, sen ajna ilo, kio multe faciligis la planadon. Mi, kiu ankaŭ devis paroli ekstere, trovis tion ĉarma. La volontuloj de la Kongreso bone aranĝis la tablojn kaj seĝojn. La vetero estis bela; la ĉeestantoj scivolemaj.

Krom la nekutime granda prelego-parto, estis pluraj interesaj momentoj dum la Kongreso. Unu el la ĉefaj estis la tre celtrafa Festparolado de José Antonio del Barrio, kiu bele ekis la paroladan parton de la Kongreso per detala historia priskribo de la Universidad Laboral mem. Kaj li, speciale li, bone scias pri kio li parolis: José Antonio dum sia juneco studis en Cheste, ĉe la Universidad Laboral. Perfekte celtrafa Festparolado, lerte kaj elegante prezentita. Alia tre interesa momento estis la ekskurso al la urbo Cheste mem. Tie okazis speciala ceremonio ĉeestata de la urbestro de Cheste kune kun la skabeno pri kulturo, kaj pluraj lokaj Esperantistoj. Kortuŝa parto de la ceremonio estis la disdonado de verdaj steloj al Esperantistoj pioniraj de Cheste, kune kun muziko de violone kaj violonĉele ludata himno de Esperanto. Poste la Esperantistoj povis gustumi manĝetojn preparitajn de la urbo, kaj spekti bele faritajn lokajn dancojn.



Kaj la loka esperanto-surprizo dum la kulturo-vojaĝo al Cheste? La anonco de tutmonda konkurso pri ideoj por antaŭenigi Esperanton. Tiu konkurso estas speciale utila al la mondo de Esperantistoj, ĉar ĝi estas financata per premioj de 1000, 600 kaj 400 eŭroj, kaj tiu mono devenas de ekster-esperantujaj fontoj. Pli konkrete: *Konkurso pri ideoj por disvastigo kaj disvolviĝo de Esperanto "Francisco Mañez"*, sponsorita de ekster-esperanta organizo: "Kultura Societo Ateneo la Alianco el Cheste". Detaloj riceveblas ĉe konkursoateneo@gmail.com. Jes ja! Grava atingo de Cheste, kaj de Ramón Diago, kiu iniciatis la ideon. Kaj jam oni parolis pri la kunlaboro de UEA, ILEI kaj TEJO por subteni la novan konkurson. Jes ja! [Vidu regularon en paĝo 16 de tiu ĉi Boletín]

La arta flanko de la Kongreso estis bone prezentita teatre kaj penike. Arno Lagrange, aktorino en esperanta teatraĵo *La Ŝakludisto*, laŭ la libro verkita de la germanlingva, aŭstrio-loĝanta aŭtoro Stefan Zweig. Esperantistoj speciale ĝuis la tre altnivelan stilon de Arno, kaj la profundan mesaĝon de la teatraĵo mem. Arno ankaŭ faris specialan prelegon pri la vivo de Zweig dum la prelego-serio. Rilate pentraĵojn kaj desegnaĵon, Niko Volosin faris specialan ekzpozicion de kelkaj el siaj karikuroj, tre ŝatataj de ĉiuj. Li ankaŭ prelegis pri karikaturoj kaj Esperanto, kaj kelkaj prelegantoj surprize konstatis alimomente, ke Niko profitis la okazon por dumprelege karikaturi ilin! Kaj se vi vidis ian artaĵon pri HEK 2024, tio devenis de la lerta peniko kaj paleta de Niko! Niko estis nia arto-estro.



Ofte dum kongresoj ne estas oficialaj manĝo-planoj, sed ĉi foje en Cheste, pro la kompleta izoliteco de la kongreso-loko, ni devis aranĝi en la kontrakto, aprobita de kaj la Universitato kaj la Valencia Registaro, manĝojn en la granda studenta restoracio apud la luksa salonego, apud ĉiuj aliaj kongreso-servoj. Tamen, subite ĉe la fino de julio, la Universitato anoncis, ke pro io, ne plu eblis manĝi apude! Tiu restoracio ne estos uzata. Ho ve! Anstataŭe ili trovis alian manĝejon, tamen tre for de la originala, kaj sen semajnfina servo. La Esperantistoj kuraĝe akceptis la defion mem plani kaj fari la manĝojn semajnfino. Tamen, tio kaŭzis horaro-ŝanĝojn kaj pluraj prelegoj estis tuŝitaj de tio. Tio ankaŭ altigis la manĝo-prezojn antaŭe anoncita en aprilo, bedaŭrinde.

Ĉiaokaze multege da belaj konversacioj en Esperanto, novaj amikiĝoj en Esperanto, eĉ novaj taktikaj kaj strategiaj planoj estiĝis dum la Kongreso. Esperantistoj babilis. Esperantistoj ĝuis la lingvon, kaj la Kongreso finiĝis post la tagmanĝo dimanĉe. Finiĝis por la plejparto, ni diru, tamen multaj restis por la Post-Kongreso, vizitante tagon post tago dum tuta semajno plurajn vidindaĵojn de Valencio, ofte kun tre interesaj ĉiĉeronoj. Ekzemple, Amri Wandel, eminenta kaj emerita astrofizikisto, gvidis la Esperantistojn tra la moderna scienca muzeo de Valencio. Kaj kiel ĉerizo sur la kuko, ofte kun malsamaj grupetoj, ni povis nostalgie tagmanĝi en la restoracio de la UK 1993, en la parko de Turia, ĉe la fama Palaco de la Muziko, kie okazis la Universala Kongreso antaŭ 31 jaroj. La UK de 1993, kaj la Scienca Muzeo estas du vidindaĵoj de Valencio. Kiom da monumentoj, muzeoj, vilaĝoj, vidindaĵoj ni vidis entute? Dekoj: la katedralo, la baziliko, la antikva kvartalo, la arto-muzeo, la parko Turia – la plej longa parko en Eŭropo, la Urbo de la Artoj kaj de la Sciencoj, la Centra Merkato, muzeo de Las Fallas, uneskaj monumentoj, mezepokaj muroj, renesancaj turoj, la botanika parko, la natura rezervo la Albufero, la rizo-kampoj, orango-kampoj, paelo, "horchata" "chufa" "fartons", tradiciaj manĝoj kaj trinkaĵoj, en tradiciaj manĝejoj kaj kafejoj.



Jes ja, ni venis, ni vidis, ni Valenciis! Unika Kongreso en la longa listo de unikaj kongresoj. Eble post dudeko da jaroj ni revidos nin ĉi tie, sed nun ni pensu pri Soria 2025. Ĉu vi sor(i)os, sor(i)as kaj sor(i)is? Eble ne, ne ĝuste tiel. tamen baldaŭ prezentiĝos detaloj pri la Kongreso en Soria, kaj baldaŭ ni povos aliĝi kaj sperti alian kvintesencon kunvenon.

**SPECIALAN DANKON** al ĉiuj de la LKK kiuj laboregis dum la Kongreso ĉe la Universidad Laboral: Luis Salag, Rosa Zanón, Ana Montesinos, Niko Volosin, Ramón Diago kaj nia ĉi-ĉi-ĉi-faranto Iván Garcia (ĉion-faranta, ĉiam-preta, ĉie-disponebla). Kaj al Carmen López Martínez, Mari Carmen Segarra, kaj Duncan Charters, kiu volontuladis la tutan alveno-tagon ĉe la stacidomo de Valencia por helpi la Kongresanojn finfine bone atingi la nefacile alireblan Kongresejon proksime de Cheste. Kaj dankon al niaj konsilantoj, kiuj helpis dum la tuta planado-periodo: Ángel Arquillos, Laura Brazzabeni, Tonjo del Barrio, Alberto Granados Orcero, kaj Miguel Ángel Sancho. Manolo Parra kaj Ana Manero. Kaj dankon al Raúl Salinas, kiu plantis la semon en aŭtuno, kiu fruktiĝis en la lastaj tagoj de la somero.

Dennis Keefe


Respondeculo pri prelegoj kaj postkongreso.

La 82a Hispana Esperanto-Kongreso.



## **\_Listo de la prelegantoj kaj prelegoj (la koro-emblemo ♥ indikas partoprenon en la AMO-Seminario:**

1 José Antonio del Barrio: Festparolado: "Kie ni troviĝas? La Labora Universitato, Cheste kaj Esperanto." 2 ♥ Laura Brazzabeni: La evoluo de la kurso 30 Oraj Horoj. 3 Arno Lagrange: Stefan Zweig: eŭropa verkisto. 4 Dennis Keefe: La Post-Kongreso: Ni venas, ni vidas, ni valencias. 5 ♥ Duncan Charters: Evoluoj de la Instruado kaj Lernado de Esperanto. 6 Euheno Kovtonjuk: UkrainIo: aktuala situacio, spertoj kaj pensoj. 7 ♥ Dennis Keefe: Esperanto-Insulo, Esperanto-Plaĝo: Ĉinio kaj Hispanio (ne okazis pro akcidento). 8 Amri Wandel: Astrofiziko por laikoj (unua parto). 9 Ismael Ejarque: Kiam la kancero estas heredita??? Kion oni devas scii. 10 Joŝe Vicente Castillo, María Adelantado -- Libro: "Los Trenes de la Esperanza." Libro: "Sonata Telúrica." 11 Niko Volosin: Karikaturaj en Esperanto-periodaĵoj kaj Libro. 12 Raia Androvska: La Verdaj Drakoj de 2024 . 13 Ana Montesinos: Ludoj en la instruado de Esperanto, pri kaj per (ŝanĝita al Kiom multe ni konas pri Esperanto en Hispanio?) 14 ♥ Duncan Charters: Kion ni povas lerni de poliglotoj pri la lernado de Esperanto? 15 Euheno Kovtonjuk: Eroŝenko: ukraina blinda esperantisto-verkisto. 16 Antoni Badia, Pedro Martinez: Ateliero pri Simplaj Magiaj Ludoj. 17 ♥ Ana Manero: Normaj numeroj kaj aliaj identigiloj de eldonaĵoj. 18 ♥ Rubén Fernández: Kia sorto por esperantaj arĥivejoj? Ekzemploj el Svisujo kaj Katalunujo. 19 Antoni Badia, Pedro Martinez: Ateliero pri Simplaj Magiaj Ludoj (dua parto). 20 ♥ Iván Garcia, Toni Espinosa: Bitarkivo.org: 9696 numeroj de historiaj revuoj, kaj vidu la libro-skanilon. 21 Amri Wandel: Astrofiziko por laikoj (dua parto). 22 ♥ Duncan Charters IKK, Interkultura Kompetento rilate al Esperanto. 23 Alfred Ramón: Omaĝo al Don Félix Navarro, grava, historia esperantisto de Valencio (ES/EO). 24 ♥ Duncan Charters: Novaj Perspektivoj pri la instruado de E-o gramatiko. 25 Antonio del Barrio: Libro: "Volontuloj kun okulvitroj". La rolo de intelektuloj kaj de esperantistoj en la Hispana Enlanda Milito. 26 Viko Manzano: Kial vi sukcesigas la neverajn novaĵojn. Konsekvencoj de la biologia evoluo. 27 Duncan Charters: La strategio laborplano de UEA. 28 ♥ Dennis Keefe: La Praktika Bildvortaro de Esperanto: Lecionoj retaj, lecionaj ĉeestaj. 29 Gabriela Manzano: Malrespektemo al infanoj. 30 Santiago Cerveró: La uzo de Esperanto en filmoj: antikvaj kaj modernoj. 31 Olga Skobeeva (Bauer): Mediaj falsaj, kiel rekoni kaj rezisti falsajn informojn. 32 FINO: Ĉiuj prelegantoj kaj atelieranoj!!! Ĉiuj temoj de la Kongreso!!! Resumitaj de la paroladanoj, gvidata de Dennis Keefe.



# 83-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO SORIO, 1-a ĝis 4-a de majo 2025

## UNUA ANONCO

### LA KONGRESEJO

La kongreso okazos en la malnovkastilia urbo Sorio. La sidejo estos la kultura centro Espacio Santa Clara, malnova monaĥejo, tute restaŭrita en la pasinta jaro, kiu disponas je ĉiuj necesaj eroj por la okazigo de la kongreso: salonoj, kunvenĉambroj, ripozejoj.



### LA TEMPO

La periodo estos la 1-a ĝis la 4-a de majo, profitante nacian festo-ponton. Kelkaj aktivajoj, ĉefe por la loka loĝantaro, okazos jam la antaŭajn tagojn, kaj oni planas postkongresan ekskurson por la lundo 5-a de majo.

### LA URBO

Sorio (Soria) estas urbo en la regiono Kastilio kaj Leono, ĉefurbo de la samnoma provinco. Ĝi estas unu el la plej malgrandaj el la provincaj ĉefurboj en Hispanio, kun ĉ. 40 000 loĝantoj. La urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj havas grandan historian signifon kaj konservas tre antikvajn monumentojn. Ĝin flankas la rivero Doŭro, kiu kreas belan pejzaĝon en la urbo.

Sorio havas grandan rilaton al literaturo. Ĝi estis admirata kaj omaĝata de pluraj elstaraj poetoj kiel Antonio Machado, Gustavo Adolfo Bécquer kaj Gerardo Diego, al kiuj ni dediĉos parton de la programo.

### LA PROGRAMO

Ni ankoraŭ laboras super la programo de la kongreso. Kiel kutime en hispanaj kongresoj ĝi enhavos kulturajn kaj distrajn erojn, en amika etoso.

Ni esperas doni specialan rolon al la literaturo, akorde kun la tradicio de la hispanaj kongresoj. Ankaŭ ne mankos muzikaj prezentadoj, prelegoj, atelieroj, ludoj, distraĵoj kaj vizitoj.

Ne mankos programeroj rilataj al la loka kulturo.  
Ni informos pri pliaj detaloj en la Dua Anonco.

## **TURISMA PROGRAMO KAJ POSTKONGRESO**

Dum la kongreso, partoprenantoj havos la okazon koni kaj ĝui Sorion, tre belan historian urbon, per gvidataj vizitoj.

Estas antaŭvidataj ekskursoj al la proksima historia loko Numantio (Numancia), kun restaĵoj de antaŭromia (kaj poste romia) urbo, kaj aliaj proksimaj urbetoj.

Oni programos postkongresan ekskurson por la 5-a de majo, por tiuj kiuj povos plilongigi sian ĉeeston en la regiono. La celo estus Burgo de Osma, historia urbo, episkopa ĉefsidejo, kaj/aŭ aliaj proksimaj lokoj.

## **GASTIGADO KAJ TRANSPORTO**

La urbo ofertas grandan variecon de hoteloj kaj aliaj gasteblecoj, de diversaj kategorioj. En venontaj informiloj oni prezentos nomojn, adresojn kaj specialajn prezojn kiujn ni ankoraŭ intertraktas, sed la LKK ne zorgos pri gastigado. Atentu ke la datoj koincidas kun landa oficiala festo, do provu rezervi kun sufiĉe da tempo.



Por atingi la urbon, alvenas tien regulaj busoj (kompanio ALSA) kaj trajnoj el Madrido (235 km). La publika transporto el aliaj urboj estas tamen malpli ofte kaj komforta. Se estas sufiĉe da intereso, oni planas komunan transporton el Madrido, Barcelono/Zaragozo aŭ Bilbao, sed tio ne estas ankoraŭ certigata.

## **LA KONGRESA KOMITATO**

Prezidanto: Mati Montero

Sekretario: Ricardo Biurrun

Kasisto: Ana Manero

Kunlaborantoj: Manolo Parra, Toño del Barrio, Félix Lobo

## **KONTAKTO**

Venontaj informoj aperos ĉe la retejo: <https://kongreso.esperanto.es>.

Kontaktu la organizantojn per la adreso: [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es).

Telefono: (+34) 638 547 104

**Dum la Hispana Esperanto-Kongreso oni anoncis konkurson lanĉitan de kultura asocio de la urbo Cheste, la Ateneo La Alianza de Cheste, kun rilato al Esperanto. Jen la alvoko:**

**II KONKURSO PRI IDEOJ POR DISVASTIGO KAJ DISVOLVIĜO DE  
ESPERANTO  
“FRANCISCO MAÑEZ”  
KULTURA SOCIETO ATENEO LA ALIANCO EL CHESTE**

La Kultura Societo Ateneo La Alianco el Cheste ANONCAS, kun la kunlaboro de la urbodomo Cheste, la Fondaĵo Cajacheste, la Esperantista Grupo Lumradio de Cheste kaj la Grupo Esperanto de Valencio, la nunan konkurson de ideoj kun la sekvaj,

**REGULOJ**

**1. Celo de la Konkurso:**

La konkurso celas promocii Esperanton tutmonde, invitante ĉiujn interesatajn homojn, prezenti novigajn ideojn, kiuj antaŭenigu ĝian lernadon, uzon kaj agnoskon.

**2. Partoprenantoj:**

Homoj kaj grupoj aŭ asocioj de iu ajn nacieco povas partopreni.

Ili devas identigi per ĉiuj siaj datumoj, inkluzive de telefonnumero, en la enhavo de la poŝto kaj ne en la prezentita laboro.

Por kontrolaj celoj, identiga numero estos atribuita al ĉiu laboro prezentita.

**3. Temoj:**

La verkoj povas trakti, inter aliaj, jenajn temojn:

- Instruajn programojn kaj rimedojn por Esperanta Lernado.
- Bitajn ilojn (apoj, interretaj platformoj, ludoj, ktp.), kiuj instigas lingvan uzon.
- Kulturajn projektojn, kiuj integras Esperanton (teatro, muziko, literaturo).
- Kampanjoj por konsciado kaj disvastigado.
- Internaciajn eventojn, kiuj antaŭenigas Esperanton.

**4. Prezento:**

-La verkoj devas esti originalaj kaj estos prezentitaj ciferece kun maksimume 3.000 vortoj en .doc, docx, .rtf, .odt, aŭ pdf teksta formato.

-Kun detala priskribo de la ideo, celoj kaj efektivigaj metodoj.

-Pliaj elementoj, kiuj klarigas, disvolvas aŭ ilustras la laboraĵon, povas esti ligitaj kiel anekso.

-La proponoj povas esti prezentitaj en la hispana kaj/aŭ en Esperanto; la prezento en ambaŭ lingvoj estos pozitive taksita.

**5. Limdato kaj loko de prezento:**

La proponoj devas esti senditaj ĝis la 31/12/24 per retpoŝto al adreso: konkursoateneo@gmail.com Ĉi tiu sama retpoŝto povas esti uzata por iu ajn klarigo rilata al la konkurso.

**6. Kriterioj por taksado:**

La ĵurio, laŭ la propono de la organizantoj, estos kunmetita de specialistoj en la kampo de Esperanto, edukado, komunikado, ktp. kiu taksos la proponojn laŭ la jenaj kriterioj:

-Noveco kaj originaleco, farebleco kaj daŭripovo de la propono, ebla efiko sur la disvastigo de Esperanto kaj la klareco kaj kvalito de la prezento.

**7. Premioj:**

La jenaj premioj estos aljuĝitaj:

-Unua: 1.000 eŭroj, dua: 600 eŭroj kaj tria: 400 eŭroj.

-Krome la finalistaj proponoj ricevos agnoskan atestilon.

#### 8. Publikigado de Rezultoj:

La rezultoj estos komunikitaj rekte al ĉiu partoprenanto per retroŝto kaj estos publikigitaj per la rimedoj konsiderataj signifaj, precipe en la ĉefaj esperantistaj revuoj kaj per la samaj rimedoj, en kiuj ĉi tiu reguloj estas publikigitaj.

#### 9. Rajtoj de la Proponoj:

Partoprenantoj konservos rajtojn pri siaj proponoj. Tamen ili akceptas, ke la elektitaj verkoj povos esti uzataj plene aŭ parte de la organizantoj de la konkurso por la reklamaj celoj de Esperanto, kun ĝusta agnosko de iliaj kreaĵoj.

#### 10. Rezulto:

La ĵuria decido estos nerevokebla kaj ĝi povos deklari iun el la premioj nealjuĝita se ĝi konsideras tion oportuna.

### KONKLUDO

Per ĉi tiu konkurso, ni celas inspiri kaj mobilizi tutmondan komunumon ĉirkaŭ la internacia helpa lingvo, antaŭenigante komprenon kaj kunlaboron inter kulturoj.  
Ni atendas viajn ideojn!

---

## FUNDACIÓN ESPERANTO

Grava atentigo:

Rilate al nuna kaj venontaj jaroj, ni disponas je pli da mono ol ni supozis komence. Indas substreki ke tio okazas danke al oferemo de bonfarulo kaj al kresko de enspezoj. Do, ni memorigas:

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpas diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2024.

Kutime, ni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj.

Lorenzo Noguero

(Prezidanto de F. Esperanto)

# INFANOJ KAJ EKSTERLANDANECO

Nuntempe niaj amaskomunikiloj ofte traktas la temon pri la alveno al niaj eŭropaj landoj de eksterlandanoj el aliaj kontinentoj.

Se plenaĝulo venas, niaj leĝoj pri eksterlandanco bone regulas la temon, sed pli tikla problemo estas kiam alvenas eksterlandaj infanoj, kaj ankoraŭ pli malfacila kiam temas pri neakompanataj infanoj.

La Internaciaj traktatoj pri la protektado de la infanoj, ĉefe post la Konvencio de Uniĝintaj Nacioj pri la rajtoj de la infanoj, de 1989, agnoskas unu el la kernaj temoj ene de la juragnosko de la infanoj, nome, la “superaj rajtoj de la infanoj”. Vere la infanoj ne povas havi propran volon ĉar ili ne havas propran maturecon por uzi ilian kapablecon kaj pro tio la juro protektas ilin. Tio rilatas al ĉiu jursfero: familia juro, nutraĵo, adopto, gepatra respondeco ktp. La infanoj ĝuas specialan protektadon en la Internacia Juro kaj, pro la fakto ke la hispana Konstitucio de 1978 agnoskas ke la fundamentaj rajtoj devas esti interpretataj laŭ la internaciaj traktatoj, la infanoj devas havi tiun specialan protektadon.

La hispana Leĝo 4/2000, de 11-an januaro, pri “Rajtoj kaj liberoj de la eksterlandanoj en Hispanio kaj sia socia integrado” kaj la nova leĝo pri eksterlandaneco de 2021 agnoskas la rajtojn pri libera cirkulado en Hispanio kaj pri la elekto de loĝejo, kaj la art.2 aldonas ke la Ŝtato, la Aŭtonomaj Regionoj, Ceŭto kaj Melilo, kaj la Urbodomoj devas inkludi en iliaj celoj la integradon de neakompanataj eksterlandaj infanoj. La teksto esprimas la deziron pri la familia reintegrado, ĉefe en la artikoloj 17,18 kaj 19. Tamen, ofte, ili devas alfronti kelkajn jarojn en “neleĝa situacio” kun la malbonaj konsekvencoj por ilia vivo. Vere ni ne povas forgesi la grandan helpon de multaj Ne Registaraj Organizoj (NRO) por akompani kaj jure reguligi la situacion de tiuj infanoj.

Laŭ tio, la forĵeto de eksterlandaj infanoj havas specialajn limojn kaj garantiojn, kaj kiam infano venas neakompanata de siaj gepatroj, au direkta familiano ne eblas la forĵeto. En Hispanio, Italio kaj aliaj landoj kiuj tre ofte ricevas eksterlandajn infanojn, ili ne povas esti resenditaj en ilian originlandon kaj ili devas esti resituataj por sia socia kaj kultura resituigado. Ofte, ni legas sur niaj ĵurnaloj polemikajn argumentojn por dissendi la eksterlandajn infanojn inter niaj Aŭtonomaj Komunumoj. La supozata dissendo de tiuj infanoj inter la aŭtonomaj komunumoj estas plenkaj kaj la kontraŭstaro al tiu dissendo estas kontraŭa al nia Konstitucio kaj al la internaciaj traktatoj.

Konklude, se la jurŝtato estas la kunvivado laŭ la leĝoj, la traktado al la eksterlandanoj kaj ĉefe al tiaj infanoj, tio estas vera kernŝtono de la juro. Nei aŭ neigi tiujn rajtojn, signifas rifuzi la internacian juron. Tre grava estas aktivadi internaciajn traktatojn kun la devenlandoj por la justa disvolvado de la paŭperigitaj originlandoj de la infanoj

Pro tio, la speciala protektado de la eksterlanda infano devas elstari sur iu ajn rasisma aŭ ksenofoba parolado, kiu certe venenas nian civitanan kunvivadon.

M. Rafaela Urueña

# PASINTECO KAJ ESTONTECO DE LA KURSOJ UNED

Komenciĝas la lernojaro 2024-2025 kaj ankaŭ la sepa eldono de la kursoj de Esperanto okazantaj en UNED (Hispana Nacia Distanca Universitato) per interkonsento kun HEF. Indas fari bilancon de la atingoj kaj proponojn por plua disvolvado, des pli ĉar ni (la instruistoj) ĝis nun ne sufiĉe informis la asocion pri nia agado. Unue, necesas meti la kursojn en sian kuntekston. Jen la nombro de niveloj kaj studentoj por ĉiuj 16 lingvoj instruataj en UNED dum la nun finiĝanta lernojaro 2023-24:

Bildo pli helpos kompari la procentojn de studentoj laŭ lingvoj:

Lingvo	Niveloj	Studentoj	Procento
Esperanto	2: A2, B1	28	0,37%
Nederlanda	2: A1, A2	43	0,57%
Galega	5: A1, A2, B1, B2, C1	65	0,85%
Ĉina	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	79	1,04%
Rusa	8: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2, B1.1, B1.2, B2.1, B2.2	129	1,70%
Japana	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	132	1,74%
Kataluna-valencia	4: A2, B1, B2, C1	142	1,87%
Eŭska	5: A1, A2, B1, B2, C1	154	2,03%
Araba	4: A1.1, A1.2, A2.1, A2.2	197	2,59%
Hispana gestlingvo	4: A1, A2, B1.1, B1.2	256	3,37%
Hispana	5: A1, A2, B1, B2, C1	?	?
Portugala	5: A1, A2, B1, B2, C1	272	3,58%
Germana	4: A1, A2, B1, B2	418	5,50%
Itala	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	563	7,40%
Franca	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	1086	14,28%
Angla	6: A1, A2, B1, B2, C1, C2	4039	53,12%
Sumo		7603	100,00%



1 Mi dankas la kunordiganton kaj A2-instruiston Félix J. Lobo pro la datenoj.

2 Ne eblis ricevi datenojn pri la kursoj de la hispana lingvo por enmigrintoj.

Tuj videblas ke Esperanto estas la plej malgranda lingvo, sed ankaŭ rimarkeblas ke la angla akaparas pli ol duonon de ĉiuj studentoj. Fakte, ĉiuj lingvokursoj de UNED estas deficitaj krom tiuj de la angla, kiuj pagas la kostojn por la instruado de la aliaj lingvoj. Kiel publika tuthispana universitato, UNED ne konsideras nur la ekonomian profiton, sed elektas instrui multajn lingvojn pro prestiĝo.

Ĉu tio signifas ke niaj kursoj estas sekuraj? Ne vere: ni memoru ke ili estas la malplej popularaj. Plie, dum nuntempe neniu dubus ke la kataluna, la galega aŭ la gestlingvoj estas veraj lingvoj, plu restas homoj kiuj principe malsimpatias al Esperanto pro la plej diversaj antaŭjuĝoj. Se unu tia homo fariĝus direktoro de la lingvocentro, tre facilus forbalai niajn kursojn el la listo sub la facila preteksto de la kostoj. Fakte, la tondado jam komenciĝis en la kategorio de "duon-ĉeestaj" kursoj, tiuj kombinantaj retan memlernadon kaj ĉeestajn lecionojn en la "alligitaj centroj" (*centros asociados*): 13 niveloj de diversaj lingvoj perdis tiun eblecon por la kurso 2024-25, kaj duonĉeestaj kursoj tute malaperis por la kataluna, la galega kaj la hispana mem. Ankaŭ mia propono okazigi duonĉeestajn Esperanto-kursojn en la UNED-centro en Barcelono estis rifuzita.



La tendenco en la nombro de aliĝantoj denove ne favoras nin:

Lernojaro kaj nivelo	Aliĝintoj	Ekzamenitoj	Sukcesintoj
2018-19 (A2)	63	20	16
2019-20 (A2)	28	7	6
2020-21 (A2)	26	13	12
2020-21 (B1)	22	11	10
2020-21 (Sume)	48	24	22
2021-22 (A2)	23	3	3
2021-22 (B1)	20	8	7
2021-22 (Sume)	43	11	10
2022-23 (A2)	17	5	5
2022-23 (B1)	13	7	7
2022-23 (Sume)	30	12	12
2023-24 (A2)	19	7	6
2023-24 (B1)	10	2	2
2023-24 (Sume)	29	9	8

La unua jaro estis escepta, ĉar multaj esperantistoj aliĝis nur por apogi la iniciaton, sed post la unua jaro de la kurso B1 la nombro de aliĝintoj kaj sukcesintoj ne ĉesis fali. Se la tendenco daŭros, mi timas ke ĉi tiu lernojaro povos esti la lasta. Por ĉi tiu aliĝoperiodo necesas celi minimume 40 aliĝontojn por la sumo de ambaŭ kursoj, kiu estos nombro komparebla al la kursoj por la nederlanda, lingvo simila laŭ populareco kaj nombro de niveloj (2). Tial mi sincere kredas ke la kresko estas la sola vojo al pluvivo de niaj kursoj en UNED, la solaj universitataj distancaj kursoj de Esperanto en la tuta Eŭropo.

Pluraj strategioj povas utili por tiu celo. Unue, necesas pli vigle varbi en la tuja medio de hispanaj esperantistoj kaj antaŭ ĉio inter la asocioj mem, per rektaj retmesaĝoj kaj tra la aliaj asociaj kanaloj. Dum la normala aliĝokotizo kostas 248 €, danke al la interkonsento UNED-HEF, membroj de la Federacio pagas nur 164 €. Mi ĝojas raporti ke nun la teĥnikaj problemoj renkontitaj antaŭ unu jaro estas fine solvitaj: HEF jam aperas en la malfaldebla listo de interkonsentintaj organizoj en la aliĝilo kaj la rabato estas elektebla:

app.uned.es/matricula-cuid/Presentacion/modCUID/nuevaSolicitud.aspx

Centro Universitario de Idiomas a Distancia  
2024 / 2025

Contacta | RSS

**ULRICH HENNEMANN**  
Ir a Gestión de Solicitudes | Cerrar sesión  
v. 1.0.4.20 R

Estás en Inicio >> Gestión de solicitudes de Matrícula >> Nueva Solicitud

Nueva Solicitud

Seleccione los datos académicos en que desee matricularse

VIRTUAL (EN LINEA)

Idioma  
ESPERANTO

Nivel  
ESPERANTO A2

Centro asociado  
BERLÍN

**Convenios**

Si considera que puede acogerse a uno de los siguientes convenios, selecciónelo de la lista

Convenios  
FED. ESPAÑOLA DE ESPERANTO

**Clase de Matrícula**

Debe indicar su clase de matrícula si no ha indicado que puede acogerse a un convenio

Clase de Matrícula  
PRECIO ORDINARIO

© UNED - Centro de Tecnología de la UNED - 2024

Due, uzante la saman rabaton, eblas ripeti la pasintjaran kampanjon por duobla varbado: ĉar la membrokotizo al HEF kun nur reta abono de nia bulteno *Boletín* kostas 30 €, nova aliĝanto al HEF kaj UNED-kurso ankoraŭ ŝparos monon. Tial ni povas reklami por kreskigi la membraron de HEF kaj la lernantaron de la kursoj samtempe.

Trie, necesas aktive reklami tiun kampanjon en ambaŭ direktoj: internen en la movadon, kie multaj izolitaj komencantoj ne emas membriĝi en asocioj, kaj eksteren, en la ĝeneralan publikon. Tio nepre signifas investi monon en reklamadon, ĉefe en Interreto. Kiel antaŭe (kaj ankoraŭ nun) faras revuoj, eĉ movadaj retejoj kiel Eventa Servo disponigas ekran-spacoon al reklamantoj kontraŭ pago, ofte kun la ebleco precizigi kaj limigi ĝin al iu difinita urbo, regiono aŭ lando, kaj tia reklamado fakte estas la sola enspezo

Fakte ĉiuj studentoj trapasintaj nivelon A2, kiel ĉiuj eksstudentoj de UNED, rajtas je rabatita kotizo 164 € kiam aliĝas al B1.

de ĵurnalaj retejoj kaj sociaj retoj. La mono por aktiva reklamado jam ekzistas: dum HEF pagas al la instruistoj de la kursoj 75% el la mono transdonata de UNED, ĝi retenas la ceteran 25%, kiu pasintjare sumis 1292 €. Tiu resto devus esti reinvestata en la kursojn de UNED per reklamado, se ne tute almenaŭ parte. Estas en la intereso de HEF varbi novajn esperantistojn kaj novajn membrojn per la kursoj de UNED, kaj en la ĵus okazinta 82a Hispana Kongreso de Esperanto en Ĉeste mi ĝojis per la unua fojo renkonti kvar el miaj lernintoj, nun tre aktivaj esperantistoj. Enmovadigi la lernantojn ĉiam estis mia prioritato kiel instruisto, kaj mi pensas ke ni estas sufiĉe sukcesaj tiurilate, kompare al tradiciaj kursoj en lokaj kluboj kie la lernantoj apenaŭ ricevas ŝancon paroli la lingvon. Kvankam UNED zorgas ĉefe pri la nombro de aliĝintoj kaj ne tiel multe pri la nombro de sukcesintoj, por ni ambaŭ estas gravaj.

Kvare, por varbi apogon inter jam lertaj esperantistoj, necesas pli diskonigi la eblecon aliĝi nur al ekzameno anstataŭ al la tuta kurso por ricevi diplomon de UNED kontraŭ 75 €. Tiurilate, HEF devas lerni la lecionojn de UEA, kiu tre sukcesis popularigi siajn KER-ekzamenojn en la movado, tiel ke aliĝo kaj studo por tiuj ekzamenoj fariĝis kvazaŭ sporto malgraŭ la kosto de la kotizo (82 € por KER-ekzameno B1, en la kazo de hispanoj). Kvankam la diplomoj de UNED aŭtomate konvertiĝas al kreditoj nur en la UNED mem, manko de oficiala agnosko ne baris la populariĝon de UEA-KER-ekzamenoj, ĉar de somero 2022, kiam UEA komencis okazigi pure retajn KER-ekzamenojn, ĝia tuta sistemo dekopliĝis de la lingvocentro ELTE Origó en la hungara universitato Eötvös Loránd kaj nun liveras diplomojn nur kun sigeloj de esperantaj organizoj ne agnoskataj kiel oficialaj lingvekzamenantoj ekster la movado. Dum unu el miaj lernintoj sukcesis agnoskigi sian ĉeeston KER-diplomon kiel meriton danke al la sigelo de Origó kiam enposteniĝis kiel funkciulino, alia ne sukcesis ricevi laboran forpermeson por la ekzameniĝo ĉar lia diplomo jam nur estis agnoskita de UEA mem. De 2022 la diplomoj de UEA kaj UNED staras sur la sama nivelo: neniu instanco devas akcepti ilin aŭtomate kaj devige, sed nur laŭvole, depende de la fidindeco kaj konateco de la subskribinta institucio. Tial, granda ŝtata universitato kia UNED havas avantaĝon, almenaŭ en Hispanio, kaj HEF devus promocii la diplomojn de UNED kiel alternativon al la ekzamenoj de KER. La celo ne estas "konkuri" kun UEA, sed ĉefe kreskigi la valoron de Esperanto por la estroj de UNED.

Kvine, necesas ne forgesi la eblecojn kreski ankaŭ ekster Hispanio. La nuna panoramo de internaciaj retaj Esperanto-kursoj ŝanĝiĝas kaj malfermas ŝancojn. Duolingo jam fermas sian kurson por hispanlingvanoj, kiu markis tutan epokon de kresko por nia lingvo. La bezono de anstataŭantoj tiel sentiĝas, ke Londona Esperanto-Klubo starigis tutan retan lernejon kun kvar niveloj kaj naŭ instruantoj. La saman ondon rajdas la kurso de Kolombia Esperanto-Ligo, kiu jam nun per la kvina fojo promesas konduki komencantojn de nulo al B1 ne en du jaroj sed... en nur du monatoj! Pro scivolemo, pasintjare mi aliĝis kiel studento kaj ne povas raporti bonajn aferojn; la didaktika kaj profesia nivelo de la instruantoj estis bedaŭrinde malalta. Kredigi, ke aŭskulti kvar horojn

UNED/UEA [Una manera de hacer Europa](#) JF a Gestión de Solicitudes | Letras Básico v. 1.0.4.20 R

Estás en Inicio >> Gestión de solicitudes de Matrícula >> **Consultar Solicitud de Matrícula**

Consulta de Solicitud de Matrícula

**Consulta de solicitud**

**PASO DE BORRADOR A SOLICITUD**

Su BORRADOR ha quedado cumplimentado y guardado.

Para pagarlo y convertirlo en SOLICITUD DE MATRÍCULA, pulse Validar.

Si quiere modificar su solicitud, pulse Atrás.

**Una vez validado el borrador no se admitirán anulaciones ni modificaciones que impliquen devolución de importe. Si quiere realizar algún cambio deberá contactar con el negociado indicado en nuestra web.**

**Datos Personales**

DNI/Pasaporte : **HY3279**      Nombre : **ULRICH HENNEMANN**  
 Teléfono :      Telf. Móvil : **678587613**      Email : **uhenneman1@alumno.uned.es**  
 Sexo : **HOMBRE**      País de Nacionalidad : **Alemania**  
 Documento del Estudiante : **H32Y79**      País Emisor : **Alemania**

**Datos de dirección**

Dirección : **GRUBENHAGENSTRASSE 6**      Población : **HERZBERG AM HARZ**      Provincia :  
 Código Postal :      País de Residencia : **Alemania**

**Datos de nacimiento**

Fecha de nacimiento : **15/07/1980**      Población de nacimiento : **FRANKFURT AM MAIN**  
 Provincia de nacimiento :      País de nacimiento : **Alemania**

**Datos académicos**

Convocatoria : **VIRTUAL (EN LINEA)**  
 Idioma : **ESPERANTO**  
 Nivel : **ESPERANTO A2**  
 Centro asociado : **BERLÍN**  
 Convenio : **FED. ESPAÑOLA DE ESPERANTO**  
 Clase de matrícula : **PRECIO ORDINARIO**

**Datos Económicos**

Total matrícula : **164,00 €**

[Atrás](#)      [Validar](#)

© UNED - Centro de Tecnología de la UNED - 2024

semajne da prelego en la hispana pri esperanta gramatiko sen apenaŭ voĉa interagado sufiĉos por atingi nivelon B1, en mia opinio estas mensoga reklamado. Ironie, la instruantoj bazis la tutan kurson sur preparado de la KER-ekzameno kun tiu nivelo, emfazante ke ĝi estas "oficiala" ĉar ĝin organizas iu hungara universitato, montrante ne plu aktualajn dulingvajn ekzamenmodelojn kaj eĉ komentante la hungaran ortografion. Samtempe, ili ankaŭ emfazis la eblecojn profesiigi kaj perlabori sian panon per Esperanto, dum ilia propra kurso plu estas senpaga kaj ekonomie nedaŭripova, ĝis la punkto ke en 2021 UEA konvinkis HEF'on donaci 1000-eŭran subvencion al KEL por tiu kurso! De mia vidpunkto, ili nur havos ŝancon profesiigi se la kursoj en UNED tiel kreskos ke HEF dungos ilin (kaj nur se HEF kontentos pri ilia profesia kapablo).

Estas vero ke, bedaŭrinde, pure retaj ekzamenoj faritaj dum la KOVIM-pandemio restis eksperimento kaj ke UNED denove postulas ĉeestajn legoskribajn ekzamenojn (la aŭda kaj parola partoj estis ĉiam retaj). Teorie tio malhelpus internaciigon de la kursoj. Tamen, UNED havas centrojn kaj ekzamenejojn en Bonaero, Karakaso, Limo, Meksikurbo, Bogoto, Kito, Santiago de Ĉilio kaj Malabo, kie sufiĉe motivigitaj studentoj povus

ekzameniĝi. Nek hispana civitaneco nek iu ajn diplomo aŭ edukiteco estas postulata por studi lingvojn en UNED: nur aĝi 16 jarojn aŭ pli. Se HEF volas disvastigi Esperanton en Latinameriko, anstataŭ subvencii amatorajn iniciatojn ĝi subvenciu latinamerikajn aliĝojn al kursoj de UNED, parte aŭ tute (sed aposteriore kaj sub kondiĉo trapasi la finan ekzamenon!). Ĝi kontaktu latinamerikajn asociojn por peti disvastigon de la anonco de subvencioj, kiuj estos samtempe bonfaro kaj reklamado; se la mono ne sufiĉos por ĉiuj petintoj, eblas okazigi konkurson aŭ loterion.

Laste, ni ne subtaksu la eblecon kreski ankaŭ ekster la hispanlingva teritorio. La hispana lingvo estas la plej studata en la mondo post angla kaj ĉina, kaj abundas multlingvuoj jam posedantaj la hispanan kaj scivolemaj pri Esperanto. Ekster hispanlingvaj landoj UNED disponas ekzamenejojn en Novjorko, Seatlo, San-Paŭlo, Lisbono, Oporto, Londono, Parizo, Bruselo, Berlino, Berno, Frankfurto, Munkeno, Romo, Varsovio kaj eĉ Albanio. Aliflanke, multaj poliglotoj lernas lingvojn kiel sporton kaj ne bezonas atestilojn, tiel ke la kampo por kresko povas esti eĉ pli vasta (unu fojon mi havis aŭstralian studenton), kaj rememoru ke UNED-burokratoj zorgas pri aliĝokotizoj pli ol sukcesoj. Por tiaj studentoj la vera problemo ne estos neebleco ekzameniĝi, sed nur la hora diferenco, kiu malhelpos partoprenon en parolaj kunsidoj. La klarigoj kaj lernomaterialoj de la kurso B1 estas tute en Esperanto; plie, la retejo kaj la virtuala kursejo de UNED havas anglalingvan interfacon, kaj ĉiukaze nuntempaj retumiloj disponigas aŭtomatan tradukadon. Laŭ mia sperto, la sola paĝo kiun mi ne sukcesis traduki al aliaj lingvoj estis la aliĝilo mem; nur tie HEF devus provizi aliĝantojn per lingva helpo kaj instrukcioj.

Resume, ĉu HEF konscios, kian atuton ĝi havas, antaŭ ol ĝi malaperos?

*Rubeno Fernández Asensio*

*Instruisto de konversaciaj klasoj por niveloj de Esperanto A2 kaj B1 en UNED*

# HEF EN LA UNIVERSALA KONGRESO DE ARUŜO



Dum la monato aŭgusto disvolviĝis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, la unua en Afriko. Laŭ ĉiuj atestoj ĝi rezultis en granda sukceso, kun alta partopreno de afrikaj esperantistoj, malgraŭ la malfacilaĵoj pri vizoj kaj transporto.

Hispana Esperanto-Federacio estis reprezentita en la Movada Foiro, okazinta la unuan tagon, kun granda akcepto kaj intereso, En la foto vi povas vidi la aspekton de nia buĉdo.

Kiel tradicie, dum la kongreso okazis la anonco de la rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA. Vi povas legi la anoncon en la gazetara komuniko de UEA ĉe: <https://uea.org/gk/1177a1>. En Jutubo vi povas aŭskulti la rezulton kaj ankaŭ videon kun gratulvortoj de la Prezidanto de la juĝkomisiono, Miguel Fernández.

# PLUVIVO

Hodiaŭ funebras mi: antaŭkelkaj semajnoj (la 11<sup>an</sup> de marto) mortis amiko, kiu redaktis la ĵurnalon, kie mi publikigis artikolojn, *VegaMediaPress*, de Mursjo. Fakte, ofte mi publikigis tie hispanajn versiojn de artikoloj, kiujn mi jam publikigis en ĉi tiu magazino, *Kajeroj el la Sudo*.

Sed tio jam estas historio! Li subite mortis je la aĝo 61jara, kaj pro stulta falo surstrata. Jes, homo estas plej alta besto sur la mondo, kaj tamen tre fragila: sufiĉas unu bato por rompi nin ĝismorte. Li estis unu el tiuj homoj, kiuj devas fari ĉion, kaj sekve li ne komisiis parton de la publikigado de la ĵurnalo al iu ajn, tiel ke, se li ne povis fari ĝustatempe la tagan eldonon, ĝi aperis poste; kaj tamen pli ol 60 000 homoj legis la ĵurnalon ĉiun tagon. Kaj kio okazas nun, post lia morto? Nu, la ĵurnalo mortis ankaŭ, ĉar ne estas homo, kiu sukcesos eldoni la komunikilon, ĉar mankas paŝvorton kaj atingon al informadikaj rimedoj, per kiuj li eldonis sian publikaĵon.

Eble leganto demandos sin pri tio, kial mi parolas pri tio. Sed la kazo de la ĵurnalo de mia kara amiko —nomita Jesuo, koincide—, estas simila al tiu de *Kajeroj el la Sudo*:

Kiel niaj legantoj scias, Antonio Marco Botella redaktis la unuajn 29 numerojn de la magazino, *Kajeroj el la Sudo*. Kiam li sentis sin senforta por daŭrigi la aferon, li petis de ni, siaj legantoj, ke iu okupiĝu pri la perioda publikigado de sia kara revuo. Post kelkaj hezitaj, mi mem volontulis, inter la miloj da legantoj de la magazino. De tiam mi jam redaktis kaj publikigis la sekvintajn 102 numerojn. Mi sentas min forta, almenaŭ por redakti multajn numerojn ankoraŭ..., sed mi estas nur unu homo, kiu povas morti subite —same kiel mia samnomulo, la redaktoro de *VegaMediaPress*—, kaj tiukaze, laŭ la nunaj kondiĉoj, tio signifus la morto de nia kara magazino, ankaŭ. Se oni serĉas la retejon <http://www.vegamediapress.com>, oni vidos, ke oni jam deaktivis ĝin, kaj sekve ĉio laboro de mia amiko jam perdiĝis, de la jaro 2003 ĝis lasta februaro 2024<sup>a</sup>.

Ĉu estas solvo por tiu problemoj? De kiam mi ekredaktis ĉi tiun magazinon, mi komprenis, ke tio ne estas mia afero, sed la afero de ĉiuj legantoj kaj amikoj de Esperanto kaj Hispanio. Do, estus domaĝe, ke nia magazino mortos kun mi, same kiel *VegaMediaPress* mortis kune kun ties redaktoro. *Kajeroj el la Sudo* legas multaj homoj dise tra la mondo, ne nur en Hispanio, do mi petas, ke oni pretu daŭrigi ilin iam en la estonto. Sed tion oni ne povos fari subite el nulo. Mi ofertas lernigi kaj helpi redaktantojn, kvankam mi ne antaŭvidas ĉesi la redaktadon en la ĵusan estonton. Mi jam aĝas 73jare, kaj se ĉio iras normale, mi ankoraŭ povos redakti ĝin dum dek, eble kelke da pli jaroj. sed se estos vicredaktoroj, kiuj povos elpreni la taskon en la estonto, mi kredas, ke esperantistoj dankos pri ties sinsekva agado.

Eble, oni demandos sin pri tio, kio estas *Kajeroj el la Sudo*, kia ĝi estas, kaj kial utilas, ke ĝi daŭrigos sian aperadon post kiam mi jam malaperis. Nu, ĉi tiu magazino aperis je la jaro 1988<sup>a</sup>, kaj de tiam geesperantistoj dise tra la tuta mondo povis legi ĝin tute senpage. Niaj paĝoj neniam estis makulataj de politika aŭ religia sintenoj, ĉar ĉiuj, kiu tion deziris, povis publikigi tion, kion ili deziris, ene de kelkaj kondiĉoj pri ĝentileco kaj

neinsulto, sed tute libere. Pro tio, ke neniun artikolon oni rifuzis, kelkaj samideanoj ĉesis sian abonon al la magazino, kvankam ili daŭre legas ĝin

Mi eĉ estis forigita de SAT ĉar ili trovis, ke mi *ne estis sufiĉe progresema*, sed ŝajne tiu progreso, pri kiu ili fieras, estas certe dogmeco kaj netoleremo al alies opinioj. Do, fakte, min forpelis de la asocio pro tio, ke mi postulis, ke oni honoru la Statuton de SAT mem, kiu atentigas kaj malpermesas tiun dogmecon kaj netoleremo! Jes, la homoj, kiuj formis tiaman Plenumkomitaton, kiu forpelis min ne plu oficas, sed la asocio mem neniam sendis al mi senkulpigon kaj inviton reveni en la asocion. Fakte, mi ne kredas, ke mi realiĝos, sed tio pruvus, ke SAT ne plu estas sekteca kaj netolerema, ĉesante ties demagogion. Tio ne utilis al mi, sed al SAT.

Sed mi ne plendu denove pri la aferon, ĉar ĝi ne vere gravas. Justa homo ne havas lokon inter maljustuloj. Tio, kio gravas, estas la pluvivo de *Kajeroj el la Sudo* en la estonto.

Sekve, vi, leganto, ĉu vi pretus helpi la pluvivon de nia magazino? Se jes, kion vi bezonos fari decidon? Verki ne estas tiom malfacila, kiel oni povus pensi. Kaj mi helpos vin. Vi ne necesas esti en la sama urbo, kie mi estas. Fakte, vi povus loĝi ĉe la alia angulo el la mondo, kaj tamen, ni kune povus redakti la magazinon, ĝis kiam vi povos fari per vi mem, kaj trovos kunredaktoron, kiu anstataŭos vin kiam vi ne plu povos fari la taskon.

Ĉu iu respondos al tiu mia invito? Se jes, retumu min al [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com), mi petas  
Jesuo de las Heras

---

## LA STRANGA ANGULO

**Onklino sciis**

### Ĉapitro 13

Ne estas mi homo, kiu eniras facile en fantaziojn. Diras mia patrino, ke ekde la naskiĝo rimarkis en mi la klaran spuron de la seriozeco. Eble la unua fojo, kiam mi ridetis, estis pro neintenca korpa reago al iu perfida vundo. Perdita ŝrabo trovis loĝejon inter malgrandaj pecetoj el ligno, kien mia dekstra piedo direktis sian movon. Tiom malema al sinesprimoj estis mi, ke anstataŭ la antaŭvidebla senespera krio, aperis humila rideto; mia unua konata rideto.

Kiel dirite, fantazioj kaj aliaj mensaj misfunkciadoj oftas en mi same, kiel oftas aŭskulti kanton el la buŝo de fiŝo. Ne serĉu tion ĉar tion vi neniam trovos.

Do mi ne rajtigas vin pensi, ke tio, kion mi tuj rakontos, temas pri imagita malveraĵo. Simple tio ne eblas.

Estis mi knabo deksepjaraĝa. Mia onklino petis "Karulo, mi ne trovas miajn okulvitrojn. Ŝajnas al mi, ke ili devas esti sur iu tablo en la labordomo de via onklo. Ĉar li nur dormas ĉi tie, ĉu vi estos tiom bonkora, ke alportos por mi la okulvitrojn?" Retorika demando. "Se li vekiĝas, eble via onklo dezirus ankaŭ iri. Tamen..." Onklino havis tian kutimon mendi demandante, lasante la deziron en la aero, kvazaŭ oni parolas al si mem. Sen ia hezito mi prenis unu el la du ŝlosilojn de la celita loko, adiaŭis kaj samrapide kiel ĉiam, ekpaŝis por la celo kontentigi mian onklinon.

Onklo Emiljo laboris kiel kuracisto en malnova domo kvaretaĝa, kiu staris tiom impona kiom malbonfartanta en unu el la stratetoj de la labirinta kvinjarcenta urbocentro. Ĉio estis silenta, krom la malsukcesa plendo de malproksima hundo. La dika ligna pordo duoblis mian altecon, montrante potencon tro malnuntempa. Mi estis unu el la malmulte da homoj kapablaj malfermi ĝin, pro la specifa movaro necesa por la tasko. Tuj enirinte oni renkontas alian pordon, nun fera, kies malfacila malfermo konkuras kun tiu de la ekstera. Mi trapasis la duan barilon kaj supreniris la marmoran ŝtuparon ĝis atingi la duan etaĝon. Tie estis la laborĉambro de mia onklo. Tie li ricevis jam milojn da malsanuloj, kies okuloj montras la esperon bonfarti danke al la fama lerteco de la kuracisto. Tie estis ankaŭ bretaro. La bretaro havis kvin bretojn. La meza el ili enhavis plurajn revuojn pri ŝako. Fakte mia onklo kutime agis kiel la oficiala kuracisto en internaciaj ŝakoturniroj. Temis pri sakraj enhavoj kaj netuŝebla trezoro. Onklo amis min kaj zorgadis mian estontecon. "Ĉi tiu serioza knabo iĝos fama lerta estonta kuracisto!". Ne gravas la fakto, ke li fiaskis pri tiu prognozo, sed ke li multe amis min. Multe sed ne sufiĉe laŭ la nediskutebla malpermeso tuŝi tiujn revuojn. Kaj mi multe respektis lin. Multe sed ne sufiĉe laŭ la rezulto, ke mi fine prenis kelkajn ekzemplerojn kaj foliumis ilin kvazaŭ tia ago vestus min per la robo de la ŝakolerteco.

Jes. Mi estis tute enmetita en la tasko.

Aŭ ne tute tute, ĉar mi rimarkis ke fine mia onklo estis jam malfermante la eksteran lignan pordon. Ho ve! Li venis. Mi ne deziris esti kaptita. Mia famo de serioza fidinda adoleskanto malaperintus. Do malrapide senbrue mi revenigis la revuojn en siajn lokojn, kiujn mi precize parkerigis antaŭ ol preni ilin. Dume, onklo malfermis la feran pordon. Restis nur meti unu revuon en sian lokon. Li komencis supreniri la ŝtuparon, kiel kutime malproksimigante paŝojn, kvazaŭ oni senlace kalkulas la distancon inter unu kaj la sekvanta. Mi rimarkis guton de ŝvito ekvojaĝante. Onklo proksimiĝis laŭ la sono, pli kaj pli forta kaj klara, pere de la sama ritmo. Mi feliĉe havis sufiĉan tempon rearanĝi la revuaron kvazaŭ neniun malbonulo miskondutis. Nature mia korpo turniĝis por la celo rigardi mian onklon kaj saluti lin.

Sed miaj okuloj trovis neniun.

"Onklo?"

Neniu respondis.

Deksepjaraĝaj kruroj malrapide subeniris ĝis rimarki ke la fera pordo estis fermita, same kiel la ligna. Neniu eniris. Neniu venis. Kompreneble mi imagis la sonon. Sed tiom perfekte! Eble mi estis tro maltrankvila pro mia malfacile akceptebla konduto.

Sed mi estis adoleskanto.

Kiu refoje emis foliumi la trezoron.

Kaj tion mi faris.

Miaj manoj karesis aliajn ekzemplerojn, pli malnovaj. Ili ŝajnis surprizigitaj kaj kelkaj montris iom da rezisto. Eble neniu malfermis tiujn revuojn ekde jardekoj. Unu el ili vokis mian atenton. Kiam mi prenis ĝin tuj rimarkis, ke estis jam prenita de mi men antaŭ minutoj. Kial tiu ekzemplero estis por mi tiom alloga?

Estis granda deziro ne nur foliumi ĝin sed fone legi, trovante ian mirindaĵon. Sed ne eblis. Tiam la sono de mia onklo estis tro klare rimarkebla. Ne eblis dubi. Li malfermis la lignan pordon. Poste venis la vico de la fera. Poste la paŝoj sur la ŝtupoj. Poste mia timo.

Heziteme, mi rigardis la ŝtuparon.

Sonoj de paŝoj. La paŝoj de granda viro. Paŝoj de peza homo, kiu kalkulas precizan tempon inter unu kaj alia treto. Sed nur sono de paŝoj.

Sento de elstara gardo invadis mian tutan korpon. Miaj okuloj serĉadis obstine ian homon. Mia buŝo deziris demandi "Onklo?" sed ili ne kapablis malkuniĝi.

Kiel klarigi? Ne eblis dubi. Mi ne rajtis dubi. Oni de dubu. La sono estis tro klaraj, tro precizaj, tro ligitaj al ununura realo. Iu malfermis ambaŭ pordojn kaj nun supreniras ŝtupon post ŝtupo senurĝe, alproksimiĝante.

Mi ne povas certigi ĉu tio, kion mi aŭskultis, estis enspiro.

Kaj ne demandu al mi, kiel mi atingis la straton. Mia sola memoraĵo estas la forta bato de la paneo, la flugoj de la kruroj kaj la aero de la kvartalo akompanante mian frenezan forkuradon.

Onklino malfermis la pordon de sia domo ricevonte min. Mi ne alportis la okulvitrojn. Ŝi ne demandis. Rimarkis la strangan mienon kaj la subitan maturecon. Kaj la rideto kaj la paco malaperis de ŝia vizaĝo. Ŝi ne demandis. Sed mi komprenis rigardante ŝiajn okulojn, ke ne estis bezonata ia klarigo.

Jarojn poste, meze de la geedziĝa ceremonio de mia frato, ŝi alproksimiĝis al mi. Ŝia spiro klare parolis pri pluraj specoj de alkoholaĵoj. Venis paca kaj feliĉa, kiel naiva junulino sesdekjaraĝa. Sed unu metron antaŭ tuŝi min, la mieno ŝanĝiĝis abrupte, lipoj tremis kaj ŝi demandis: "Karulo, ĉu... ĉu vi renkontis ĝin? Ĉu vi vidis ĝin tiun nokton?" Ŝi ne atendis respondon. Subite refoje ridetis, koloroj revenis al ŝia vizaĝo kaj ŝi paŝis rapide ĝis la trinkejo.

Ne. Mi ne imagas fantaziojn. Mi estas serioza plenkreskulo, kiu neniam refoje eniris en tiun konstruaĵon, ankoraŭ starante fiera en tiu malhela strateto de la labirinta centrourbo.

Viko

# ESPERANTO EN VIRTUALA MUZEO PRI LA HISPANA MILITO

La sola virtuala muzeo pri la hispana enlanda milito enhavas nun tekston pri la uzo de Esperanto dum tiu historia evento.

La muzeo troviĝas (eble paradokse) en retejo de scienca konsilio en Kanado, sub la gvido de prestiĝaj historiistoj, kaj enhavas multajn paĝojn kaj bildojn pri la milito en ĉiuj ties vizaĝoj, el la bataloj aŭ la internacia kunteksto ĝis la ĉiutaga vivo kaj la spertoj de la ordinaraj homoj. Eblas ĝin viziti en la adreso: <https://vscw.ca/>. La plejmulto el la paĝoj havas versiojn en la hispana, la franca kaj la angla, kaj kelkaj en la ceteraj hispaniaj lingvoj.

La teksto pri Esperanto uzas kiel bazon la faman afiŝon kun la teksto “Kion vi faras por eviti tion? Geesperantistoj el la tuta mondo agu energie kontraŭ la internacia faŝismo!”, kaj eksplikas la rolon de la internacia lingvo en la propagando, ĉefe de la respublikana flanko.

La artikolo estas legebla en jenaj adresoj: <https://vscw.ca/index.php/es/node/480> (hispane), <https://vscw.ca/index.php/fr/node/480> (france) kaj <https://vscw.ca/index.php/en/node/480> (angle)



## PRI GAZA EN EL CORAZÓN (PRI GAZAO EN LA KORO)



Antaŭ nelonge, ni sciiĝis, ke la pasintan 14an de septembro, kadre de la ĉiusabata manifestacio en la placo t.n. Plaza del Castillo, en la urbo Arenas de San Pedro (Ávila-Hispanio), kontraŭ la genocido praktikata de Israelo al la Palestina popolo, aŭdiĝis la voĉo de nia poeto Miguel Fernández en deklamo de sia poemo *Gaza en el corazón*. Temas pri hispanigo fare de li mem de sia originale Esperanta *Gazao en la koro*. Hispanigo, kiun la organizantoj de la manifestacio elŝutis el pria Jutuba videaĵo spektebla ĉe: [<https://www.youtube.com/watch?v=a2zgApougmc>]. Kaj tio nin aparte ĝojigas. La fakto, ke poemo de E-poeto ne plu apartenas nur al li mem kaj al Esperantujo, sed ankaŭ al la hispan-

lingva popolo, estas vera sukceso kaj lia propra kaj de la Esperanto-kulturo. Emociplenan gratulon!

mz

# IOM DA MATEMATIKO (15)

## Komparante rabatojn de superbazaroj.

Kiam ni vizitas superbazon oftas grandaj afiŝoj, kiuj kaptas nian atenton. Ili kutime propagandas rabatojn, kiuj povas esti tre diversaj. Hodiaŭ ni okupiĝos pri kelkaj el ili.



Ni komencu per tiu ĉi rabato, kiu promesas donaci al ni unu varon kondiĉe ke ni aĉetu du unuojn de ĝi. Estas tiu rabato “2x1” (ni prenas du samajn varojn sed pagas nur unu). Facile kalkulebla, la rabato estas 50%.



Tre simila al la antaŭa estas tiu ĉi rabatoferto. Tamen, la nombroj ŝanĝas: nun estas “3x2” (ni prenas tri samajn varojn sed pagas nur 2).

Kalkuli la rabaton estas iom pli komplika ol antaŭe. Nun ni ricevas unu senpagan varon el tri, sekve la rabato estas unu el tri aŭ, kiel oni skribas en matematiko,  $1/3 = 0,3333$ . Se ni deziras traduki tiun kvanton al elcentoj, estas 33,33%.

Estas klare ke tiu rabato estas malpli interesa ol la antaŭa, kiun ni vidis.



Nun estas la vico de tiu ĉi rabatpropono. Ni okupiĝos nur pri nombroj sed ankaŭ eblus diskuti ĉu la bildo estas deca el etika vidpunkto: niaj okuloj tuj kaptas tiun “-30%”, sed ĝi rilatas nur al la dua varo aĉetita.

Nu, se oni deziras scii la realan koston de unu varo, ni devas fari jenan aritmetikan operacion:

$$(8,70 + 6,09) : 2 = 7,395 \text{ €}$$

Kaj la elcenta rabato evidente estus 15%.

Malpli interesa ol la du antaŭaj.




Rabatoferto sama ol la antaŭa sed kun malsimila prezo por la dua varo.

Kiel antaŭe, se ni deziras scii la realan koston de unu varo, ni kalkulu  $(13,76 + 4,13) : 2 = 8,945 \text{ €}$

Kaj la elcenta rabato estus 35%.

Ve!, unuavide ni pensis ke unu botelo de olivoleo kostas nur 4,13 € (nekredeble post terura plialtiĝo de ĝia prezo).

Por fini, iom ni diru pri alia rabatoferto, kiu promesas ke ni ne devos pagi la aldonvalora imposto (AVI), konata kiel IVA en la hispana.



Ni pensu pri kiu ajn varo, kies normala kosto + AVI estas 100 € kaj ni supozu ke AVI de tiu varo estas 21% (ĝenerala, sed ne ĉiama, AVI en Hispanio).

Intue, ni rapide faras matematikan operacion: 21% de 100 € estas 21 €, do ni devos pagi  $100 - 21 = 79 \text{ €}$ .

Sed la realo ne estas tia:

Se ni aĉetus varon, kies prezo sen AVI estus, ekzemple, 80 €, ni devus aldoni tiun ĉi imposton. Sekve, kion ni devus pagi estus

$$80 + (21/100) \times 80 = 80 + 16,80 = 96,80 \text{ €}$$

La antaŭan operacion ni povus skribi jene:

$$80 + (0,21 \times 80) = 80 \times (1 + 0,21) = 80 \times 1,21 = 96,80 \text{ €}$$

Tiu estus la prezo kun AVI. Do, la prezo sen AVI estus  $96,80 : 1,21 = 80$ .

Revenante nun al nia unua ekzemplo, en kiu la fina prezo (kun AVI) estus 100 €, la prezo sen AVI estus  $100 : 1,21 = 82,64 \text{ €}$

Do, se oni ne devas pagi AVI-n, nia enspezo estos  $100 - 82,64 = 17,36 \text{ €}$ , ne 21,00 €, kiel ni kalkulis unuavide.

Jesús M. García Iturrioz

jmgiaa@hotmail.com



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
ESPERANTA KONGRESO: FEDERACIO

## 83-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Soria, 1-a ĝis 4-a de Majo 2025

### ALIĜILO

83a Hispana  
Esperanto-Kongreso



Soria 1a - 4a majo 2025

Plenigu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de HEF. Oni ankaŭ povas uzi la retadreson [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es), aŭ la formularon troveblan en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso/>

PERSONA NOMO .....FAMILIA(J) NOMO(J).....  
ADRESO .....  
URBO..... LANDO/REGIONO.....  
RETADRESO..... TELEFONNUMERO(J) .....  
MEMBRO DE HEF: Jes Ne NASKIĜDATO ..... (nedevice, nur por statistiko aŭ rabato)  
DATO DE PAGO<sup>(1)</sup>..... MANIERO DE PAGO.....  
KATEGORIO.....  
KOTIZO.....  
DONACO.....  
SUMO.....

### KOTIZOJ

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis la 31-a de decembro 2024 <sup>(1)</sup>	Inter la 1-a de januaro kaj la 31-a de marto 2025 <sup>(1)</sup>	Post la 1-a de aprilo 2025 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF	40€	50€	60€
Ne membro de HEF	50€	60€	70€
Juna membro de HEF (malpli ol 30)	20€	30€	40€
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30€	40€	50€
Akompananto aŭ eksterlandano <sup>(2)</sup>	40€	50€	60€
Lernanto <sup>(3)</sup>	20€	30€	40€

La aliĝo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-2008.  
Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian ekonomian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn.

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) En tiu ĉi kunteksto, Akompananto estas homo kunloĝanta kun alia aliĝinto kaj Eksterlandano signifas homon loĝantan ekster Hispanio

(3) Aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aligitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2024 kaj aprilo 2025, kaj lernantoj de la kurso en UNED 2024-2025. Bv. havigi la detalojn de la kurso en la komentoj.

Bonvolu pagi la kotizon per nia konto ĉe Paypal ([admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)) aŭ per enbankigo, nepre indikante la tekston "Kongreso" kaj **vian nomon**, en la bankokontoj de la "Federación Española de Esperanto":

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025 aŭ BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961.

### ALIAJ INFORMOJ

MI ESTAS INTERESITA PARTOPRENI EN KOMUNA VOJAĜO SE ĜI OKAZAS: Jes Ne EL KIU URBO?

MI PRETAS PARTOPRENI EN LA PROGRAMO: (aparte menciu proponon)

ALIAJ KOMENTOJ:

PAPERAN ALIĜILON SENDU AL LA ADRESO DE HEF: C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7, ES-28015 Madrid (Hispanio)

NOTO PRI PERSONAJ INFORMOJ: VIA NOMO KAJ DEVENLOKO (LANDO/REGIONO) APEROS EN RETA LISTO DE ALIĜINTOJ KAJ EN KONGRESLIBRO; VI RAJTAS PETI KE VI NE APERU EN TIU LISTO KAJ ANKAŬ SUGESTI LA MANIERON SUB KIU ĜI APERU.

CETERAJ INFORMOJ ESTOS ARKIVATAJ ĈE HEF KAJ UTILIGATAJ NUR POR INTERNAJ CELOJ